

NI ĈIUJ

INFORMILO PRI ESPERANTO

MEKSIKO, februaro 1983

Nº 2

La krizo atingis nin!

La situacio kiun travivas nia lando estas, tagon post tago, pli malfacila. La teruraj sekvoj de la ekonomia krizo ŝajnas nemezureblaj, kaj forta ondo de seniluziiĝo trakuras Meksikion. Kio okazas? El la plej simpla, eĉ naiva vidpunkto, la fakto estas ke mankas mono. La inflacio atingis dum la pasinta jaro la katastrofan nivelon de 100%, kaj neniuj vidas la elirejon al tiu ĉi situacio.

Por ni, esperantistoj, kiuj estas forte ligitaj al eksterlando, tio tutsimple signifas preskaŭan neniigon de niaj rilatoj per esperanto. Aĉeti libron estas por ni sesoble pli koste ol pasintjare; vojaĝi al kongreso ŝajnas freneza utopio. Eĉ la kosto de la korespondado ankaŭ altiĝis. Kiel ni uzos esperanton? Ĉu al ni restas nur revii pri la estonteco? Ĉu nura interbabilado ĉe ni? Kiel fronti la krizon?

Se mi bone memoras la grekaj etimojn, la vorto 'krizo' devenas de la greka 'krino', kiu signifas "mi decidas aŭ mi juĝas". Kriza tempo estas, do, tempo por decidi kaj juĝi. Ni devas decidi kion ni faros el tiu granda, viviga idealo kiu por ni reprezentas esperanto. Esperantismo estas io plu ol nura libro-legado aŭ kongresaj vojaĝoj. Ni devas peni trovi ĉe ni mem la necesajn fortojn, la taŭgajn rimedojn por atingi nian celon. Se ni bone organizas niajn kapablojn, ni certe travivos tiun ĉi krizon. "Ni dankas le venton, kaj repurigitaj, ni forton pli freŝan akiras. Ĉu vi memoras kiu diris tion?"

AŬDITE, VIDITE, LEGITE

La pasintan 14an de februaro, s-ino Tanguna kaj la redaktoro vizitis s-ron Miguel Carriedo, direktoron de Radio UNAM. Kiel ni anoncis en la pasinta bulteno, estos organizata radio-kurso de esperanto. Por ekinteresi la aŭskultantaron, s-ro Carriedo proponis unue elsendi intervjuojn pri la internacia lingvo, kaj poste ekkomenci la kurson mem. Por la surbendigo de la kurso, familio Nájera afable proponis sian tutan ilaron kaj ejon, kiu cetere estas profesia aranĝata. Ni povas esperi grandan sukceson al tiu ĉi laboro.

Ni ricevis inviton partopreni la Poezian Konkurson "Internacia Amikeco 1983", organizita de Triesta Esperanto-Asocio. Ĉiu aŭtoro rajtas prezenti unu poemon ĝis la 31a de majo 1983. La adreso de la sidejo estas: Triesta Esperanto-Asocio, Via Trento 1, I 34123, Trieste, Italio,

Korespondemuloj! Se vi volas korespondi kun 12jara infano, skribu al Huszár Csaba; 24420 Kanjiža, Vojv. Putnika S, Jugoslavio.

S-ro Ángel Segura skribis al tiu ĉi bulteno, dezirante "ĝian sinsekvan kaj longdaŭran aperadon". Li sugestas ke ni invitu diversajn personojn partopreni la redaktadon de tiu ĉi informilo. Invito kiun ni kore etendas al ĉiuj interesiĝintoj diskonigi sian opinion pri nia movado. S-ro Segura ankaŭ reportas pri sia traduko de du noveloj de Juan Rulfo, kaj parto de la romano "Pedro Páramo", de la sama aŭtoro. Ni devas konfesi ke, por la traduk-rondo anoncita en la pasinta informilo, ni pensis ankaŭ pri tiu sama romano. Ni eĉ komencis ankaŭ traduki ĝin, ne sciante pri la laboro de s-ro Segura. Tamen, pro personaj aferoj neprokrasteblaj, tiu tradukrondo povos ekfunkcii ekde venonta aprilo. Ĝis tiam, ni atendos aliajn respondojn.

Alia argumento proponita de Kondratov estas jena: “lingvo disvastiĝas kian ĝi estas necesa”. Ni demandas: kial estas necesa iu lingvo? Ĉar ĝi estas disvastigata! Do, kial disvastiĝas lingvo? Ĉar ĝi estas necesa! Tia scienco komfortigas nian koron kaj igas nin deziri al tiu eminentuloj bonan sukceson en sia laboro!

Ni daŭre bonvenas ĉiujn kontribuojn, informojn aŭ opiniojn pri tiu ĉi informilo. Bvl. kontakti Jorge Luis Gutiérrez, Pachuca 165-3, México D.F. 06140

NI ĈIUJ

INFORMILO PRI ESPERANTO